

v. 30 #5

PR

PRINCETON UNIVERSITY

RECEIVED



AMERIKA

ESPERANTISTO



Nov., 1922



OFFICIAL ORGAN
of
THE ESPERANTO ASSOCIATION
of
NORTH AMERICA



STRIKE WHILE THE IRON IS HOT—A CLASS THEN AND THERE
BOOKS and PROPAGANDA Material of all kinds are on sale at The **ESPERANTO OFFICE**

Drop us a postcard asking for a catalog

THE ESPERANTO OFFICE, 507 Pierce Building, Copley Square, Boston 17, Mass., Usona

MISERERE (Wagnalls) kaj THAIS (France) Po \$50.

La ROZUJO ĈIUMILJARA (Wagnalls)

La AKROBATO de Nia Sinjorino

BLANCHE, la Virgulino de Lille (Schubtn)

MIMI, Rakonto pri la Latina Kvartalo

dum la Milito (Giesy)

Po \$35.

La unuaj eldonajoj tradukitaj de
S-RO EDWARD S. PAYSON

Prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko

Ĉetebblaj ĉe la Esperanto Office,

Po \$0.35

Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass.

DEZIRAS KORESPONDI

Four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address. Additional matter: 10 c. per line or fraction thereof.

Kvarfoja anonco: 5 poŝtaj respond-kuponoj. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso. Plia linio aŭ parto: 2 r. k.

Mrs. Derry, 156 Douglas Rd., Acocks Green, Birmingham, England, d. k. kun Boston aŭ Usono.

S-ro Jan Merta, Forberk 5, Wamberk, Ĉekoslovakia.

Oklahoma City, Okla. (Usono) Grupo. I.P.K., L. Sin turnu al R. E. Dooley, 527 North Durland.

S-ro Elmer Nicholas, Miller, Missouri, P.M., I. P. K., leteroj pri historio, arkeologio, scienco.

S-ro Judson R. Rude, Lanesboro, Penna.

S-ro Pedro Juarez Cano: (Studento) Box 148, Santa Clara, Cuba: kun gesamideanoj de tuta mondo, per l. aŭ I. P. K.; dez. interŝangi P. K. (p. m. bfl.) kaj p. m.

THE WRITER'S MONTHLY

Edited by J. Berg Esenwein

A magazine of real help for those who write. Carolyn Wells says:

"The best magazine of its kind because it is practical."

Single copie s 15 cents . . . \$1.50 a year

THE WRITER'S MONTHLY, Dept. A
Springfield, Mass., U. S. A.

ATTENTION! ESPERANTISTS!

The LLANO PUBLICATIONS

record the doings of the Llano Co-operative Colony in Louisiana. This group of co-operators are using Esperanto largely and aim to use it in their every day work. It is probably the only community of its kind. Children are taught Esperanto in the High school course. They are also co-operating in the production and distribution of the necessities of life. They have a beautiful social life in a healthy happy community. Write for literature and ask for a sample copy free.

LLANO CO-OPERATIVE COLONY

Leesville, Louisiana.

SKANDINAVA ESPERANTISTO

Monata internacia gazeto, ĉefe en Esperanto, parte en sveda lingvo. Enhavas artikolojn pri lingvoj, scienco, propagando esperanta, informojn ĉiuspecajn, k. a.

Jarabono: duondolaro

Adm: Skandinava Esperanto-Instituto,
419 Seventh St., Rockford, Illinois,

USONO

ADVERTISE IN ENGLISH — AND IN ESPERANTO

Reklamoj \$20. po paĝo—¼ paĝaj aŭ pli—10 numeroj sen ŝanĝo \$150. Perantoj skribu, pri rabato.

Amerika Esperantisto

American Esperantist

CAMBRIDGE 38, MASS.

Subscriptions, etc. to Boston Office, redakcia adreso, 12 Ash St. Pl., Cambridge 38, Mass.

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

One Dollar a Year. Single Number 10 Cents.
Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare.

Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without further permission.

Published Monthly by

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Vol. 30

November, 1922

No. 5

IDEALS AND THE PRACTICAL

The League and the Language

As to the past of Esperanto, one may say that it long lay in the realm of ideals. Idealists like Tolstoy strove to further the tongue; ideal motives held the samideanoj firm; a vision of eternal peace and of human brotherhood. May that ideal part of our aim never fade from sight. But idealism gave rise to several shortcomings; dreamers dreamed away the golden hours instead of giving time and energy to learning the language of which they dreamed and which they recommended to others. A writer in the columns of Esperanto Triumfonta sums up the modern viewpoint in a trenchant article entitled "Paroladu."

We in America have been slower to face the practical aspect of Esperanto, but it is high time we caught up with the procession. We must, in the language of the street, "put up" or "shut up"; learn Esperanto ĝisfunde, or stop talking about it,—for the public, already interested the world over, is now demanding practical demonstration, no vague theories. The future of Esperanto lies in the number of those who will actually learn the language and put it to use. This is, in short, the answer of the League of Nations to our request that they urge Esperanto teaching in the schools. In adopting its report, tho deferring conclusive action as to schools, the League definitely disposed of mere empty claims, as those of conflicting theories—"explained by a simple difference in the point of view."

"A study of the history of the proposed reforms such as Ido and Esperantide, which are in many points contradictory, leads to a fear that if a new committee of theorists met today, such as the committee which proposed Ido in 1907, it would propose further modifications which in their turn would be criticised at the end of a few years and so on indefinitely."

"It seems certain that there may be more than one suitable form of language and that it would be rash to claim that any individual one is incontestably superior to all others on all points." "From a practical point of view, there is less risk in taking one of which some experience has been gained, and which has already attained some tradition and a guarantee of lasting unity."

"Esperanto is certainly the most widely spoken artificial language in universal congresses and in gatherings of all kinds, in travelling, in international offices, and even in the theatre. **This makes it a living language**—a characteristic not possessed by any of the systems which are only written and not spoken. It has become possible to express feelings in it. After 35 years the language has begun to attain a style."

"It is not enough to decide on the best possible language (on the supposition that a universally accepted principle can be found). We must not only discover a language which is universally accepted as satisfying certain requirements: we must also see that it is adopted and taught."

The report goes on to annex statistical proof of Esperanto's life and to record official action taken regarding it. Every other solution and modification of Esperanto—Parlamento, Occidental, Neo-Latina, Esperantide, Ido, etc., etc., were definitely discarded, not on any matter of merit or demerit, but as a withdrawal of force from the only practically possible present day solution, Esperanto.

Those who fear that we have overstated the case as made out by the League of Nations, are referred to the official report itself—to be seen at the Esperanto Office, or *ce* the editor, or obtained from the League itself. A pocket size reprint is, we understand, being prepared by the B. E. A.

Those few who have differed from us in the past, or who in discouragement of fond hopes, have fallen aside into the paths of reform schemes, are urged to consider this careful choice of $\frac{7}{8}$ of the earth, and return to the star of hope for the world's future.

There are those, too, who have never sensed the part that Esperanto has to play in the future of the League of Nations. We venture to here outline it.

The League of Nations was founded upon an ideal vision, whatever we may think of the draft of the Covenant as it emerged from the hands of the diplomats. Men saw the vision of a world united in peace; of a law of justice equal to all, not merely one of self-defense; of a world which could give its attention to healing the wounds of all sorts of the past, not to creating new ones. Few as were the men who first painted that picture, they inspired with it the hearts of all humankind. It stayed the sword quicker than any cannon.

Here was the ray of loving hope that illumined the hateful blood-scented atmosphere into which the League of Nations was born. A new world—perhaps to be an unsordid era—was being born.

The infant lives, but thru a sickly, precarious infancy, disowned by Usona, its very existence threatened ever and anon by the bickerings of its diplomatic nurses and doctors. What is lacking? Where is the remedy?

There is one practical remedy, so inherently natural that it is no longer being denied. The peoples of the world, not merely the world's leaders, must grow to welcome the League; to adopt and cherish it as their own; not merely to leave it to the mercy of their nationalistic champions. But as clearly as history can be read, that will never be possible while the world is split up into the present hating language groups, each building up its own heritage of false beliefs and exaggerated traditions, and each striving for its own advantage, and threatening with oblivion any and every diplomat who deviates from his path of strict nationalism to the side of truth or justice.

There must be a common bond, a common language to tie the world together spiritually and mentally. Why hope to inspire the world's masses with affection for a plaything of diplomats and interpreters? What can be the interest of, say, a Chinese farmer, in what the delegates of South America are saying by interpreter in English or French in far away Geneva? Is there one chance in a million that such news will ever be translated through to him or his family.

Put Esperanto into the schools of the world; let the son of that Chinese peasant read in Esperanto of the matter, and he will bring it back from school to the family fireside. The League will then be a living vital reality to that home; the world a unity; its problems man's common concern; its betterment, his aim.

Will Esperanto bring peace immediately?—perhaps it will; the certainty is that it will make possible a harmony of spirit, an appreciation of others, otherwise impossible. Esperanto can do its work with or without the aid of the League. The Language can live without the League more easily than the League without the Language.

Amerika Esperantisto, as an organ of English-speaking North America, is partly within, partly without the League. (Therefore we have deferred these meditations until after the November elections, lest any political aim be inferred.) Those among us who have hoped in vain for the participation of Usona in the League of Nations need not cease our endeavors. No slightest motive of patriotism or party loyalty to league or nation will stand in the way of learning the "living" world's speech, and laying the only possible foundation for world unity and league stability. Whether or no the League lives on or a substitute takes its place, there is only one way practicable in which world-union can reach the ears and hearts of humanity and that is thru the progress of a universal auxiliary language for all men—to wit, Esperanto.

RESOLUTIONS ADOPTED BY THE FIFTH COMMITTEE OF
THE THIRD ASSEMBLY

on September 14th, 1922, (and by the Assembly Sept. 21)

1. That the Report of the Secretariat on Esperanto as an International Auxiliary Language be adopted, subject to the following amendments:
 - (a) That the corrections communicated by the British Delegation be made and that Chapter V of the Report be omitted.
 - (b) That an annex be added to the report, consisting of the whole of the brief and impartial report made by the Paris Chamber of Commerce on February 9th, 1921, of which certain passages only have been quoted.
 - (c) That the resolutions adopted by the Committee be annexed to the report.
2. That questions relating to the teaching of Esperanto be referred to the Committee on Intellectual Co-operation, in order that that Committee may give its opinion on the various aspects of the problem of an international auxiliary language.

AMENDOJ AL LA KONSTITUCIO DE USONO
(The United States Constitution in Esperanto)

Vidu la Septembran numeron, kaj por traduko de la Konstitucio mem vidu la numerojn de Oktobro, Decembro, 1917, Januaro, 1918.

XII*

La Elektoroj kunvenu en siaj respektivaj ŝtatoj kaj balotu Prezidanton kaj Vicprezidanton, el kiuj almenaŭ unu ne estu loĝanto de la sama ŝtato kun tiuj: ili nomu en siaj balotiloj la voĉdonatan Prezidanton, kaj en apartaj balotiloj la voĉdonatan Vicprezidanton, kaj ili faru apartajn listojn de ĉiuj voĉdonataj Prezidanto kaj de ĉiuj voĉdonataj Vicprezidanto, kaj de la nombro da voĉoj por ĉiu, kiujn listojn ili subskribu kaj legitimu, kaj sendu sigelitajn al la regsidejo de Usono, adresitajn al la Prezidanto de la Senato;—La Prezidanto de la Senato, en ĉeesto de la Senato kaj Ĉambro de Representantoj, malfermu ĉiujn legitimajojn kaj la voĉojn oni tiam kalkulu;—La persono havanta la plejnombbron da voĉoj por Prezidanto estu la Prezidanto, se tiu nombro formas plimulton de la tuta nombro de l'Elektoroj difinitaj; kaj se neniu havos tian plimulton, do el ne pli ol tri personoj havantaj la plej altajn nombrojn sur la listo de la voĉdonitaj Prezidanto la Ĉambro de Representantoj balotu tuj la Prezidanton. Sed elektante la Prezidanton, oni voĉdonu ŝtate, po unu voĉo ĉe la reprezentantaro el ĉiu ŝtato; kvorumo tiucele konsistu el membro aŭ membroj el du trionoj de la ŝtatoj, kaj plimulto de ĉiuj ŝtatoj necesu por elekto. Kaj se la Ĉambro de Representantoj Prezidanton ne elektos, kiam ajn la elektraĵo sur ilin falos, antaŭ la kvara tago de la plej proksima Marto, do la Vicprezidanto oficu kiel Prezidanto, kiel okaze de morto aŭ alia laŭkonstitucia malkapabliĝo de la Prezidanto. La persono havanta la plejnombbron da voĉoj kiel Vicprezidanto estu la Vicprezidanto, se tiu nombro formas plimulton de la tuta nombro de l'Elektoroj difinitaj, kaj se neniu havos plimulton, do el la du plej

altaj nombroj sur la listo la Senato elektu la Vicprezidanton; kvorumo tiucele konsistu el du trionoj de la tuta nombro de la Senatanoj, kaj plimulto de la tuta nombro necesu por elekto. Sed neniu laŭkonstitucie ne enoficigebla kiel Prezidanto estu enoficigebla kiel Vicprezidanto de Usono.

XIII**

Sekcio 1. Nek sklaveco nek kontraŭvola servigado, esceptinte pune pro krimo, pri kiu la persono estos orde kulp trovita, ekzistu en Usono, aŭ aliloke sub ĉi ties regado.

Sek. 2. La Kongreso povu plenumigi tiun artikolon per konforma leĝfarado.

XIV**

Sekcio 1. Ĉiuj personoj naskitaj aŭ regnanigitaj en Usono kaj sub ĉi ties regado estas civitanoj de Usono kaj de la ŝtato, en kiu ili loĝas. Neniu ŝtato faru aŭ plenumigu leĝon ajn, kiu bridos la privilegiojn aŭ imunecojn de civitanoj de Usono; kaj neniu ŝtato senigu iun ajn je vivo, libereco aŭ propraĵo sen orda proceduro, nek rifuzu al iu ajn sub sia aŭtoritato la egalan ŝirmon de la leĝoj.

Sek. 2. Reprezentantoj estu proporciataj inter la diversaj ŝtatoj laŭ iliaj respektivaj nombroj, kalkulante la tutan nombron de la personoj en ĉiu ŝtato, ekskluzive de Indianoj senimpostaj. Sed kiam la voĉrajto ĉe iu ajn elektado por elekti Elektorojn por Prezidanto kaj Vicprezidanto de Usono, reprezentantoj en la Kongreso, la administraj kaj juĝaj oficistoj de ŝtato, aŭ la membroj de ĉi ties Parlamento, estos rifuzata al iuj el la virseksaj loĝantoj de tia ŝtato (se dudek-unujaraj kaj civitanoj de Usono), aŭ iel ajn bridata, esceptinte pro partopreno ĉe ribelo aŭ alia krimo, la reprezentbazo en tiu ŝtato estu malaltigata laŭ la proporcia rilato de tiuj virseksaj civitanoj kun la tuta nombro de la virseksaj civitanoj dudek-unujaraj en tiu ŝtato.

*Tiu amendo anstataŭas Kl. 3, Sek. 1, Art. II de la Konstitucio kaj ĝin nuligas. Ĝi estis akceptata en 1804.

**Tiujn amendojn (kune kun la XVa) proponis la tri Kongresoj kunvenintaj tuj post la Interna Milito (1861-65), kiu ekstermis tra Usono la negran sklavigadon, (po unu amendo ĉe ĉiu Kongreso).

(Daŭrigota)

H. M. S.

LA ĈIFONOJ DE AMO

3a parto

Kortuŝanta montrado de fidela amo, tiun agon lastan de la milionulo, ĉiuj opiniis. Sed ĉe Marta, kiu havis tiom da kaŭzo kiom da ripozo por pensi pri Petro, ofte venis duboj. Ŝi timis, sed silentis, ĉar senpova ŝi estis kontraŭ—tio kion ŝi timis. Ŝi mem ne sciis kion.

Profesoro Konaŝĝin en sia ĉefverko, "La Virina Influo en la Vivoj de Napoleonoj de Financo," sur du paĝoj citis tekston el la testamento de Petro, kiel "...pruvo ekster dubo ke glora memoro de la amo unua regis antaŭ ĉio en la vivo de tiu figuro granda inter la sukcesaj viroj de la Granita Ŝtato." Venis tago kiam la psikologo okaze travojaĝis la vilaĝon, kaj Marta al li sendis inviton ŝin viziti.

“Mi rememoras leginte koncerne vin en ĵurnaloj,” diris renkonte la psikologo.

“Sinjoro, oni jam atentigis min pri via libro,” interrompis Marta. “Estas pro ĝi ke mi petis ĉi tiun intervjuon.” Sur terason ŝi kondukis lin, kaj montrante malproksiman dometon ĉe la vilaĝa rando, parolis:

“Tie, sinjoro, tra feliĉaj jaroj mi vivis en malriĉeco laboranta, sed ĉirkaŭita de io pli bona ol lukso, amantaj edzo kaj infanoj. Nun, levu la okulojn al la tombejo monteta. Tie restas hodiaŭ miaj infanoj. La filino edziniĝis kun fremda grafo, kiu forlasis ŝin post kiam li elspezis sian monon. Ŝi mortis de vundita koro. Miaj du pli aĝaj filoj forgesis siajn metiojn, tuj kiam ili havis tro da mono, kaj ne laborante plu komencis montri la senzorgan karakteron de sia patro. Aŭtomobila kunfrapago dum furioza veturado nokta, forrabis ilin de mi. Restis mia pli juna filo; dum foresto ĉe universitato fremdlanda, kien li iris por kompleti sian edukon, li akiris kiel sia patro deziron por alkoholaĵo, kaj ĉar lia mono provizis senliman indulgon li suferis teruran morton. La edzo ja vivas ankoraŭ, vere, sed ne por mi kiel en la kompare idilia vivo tie en la kaduka dometo sube. Per mono ricevita pro la morto de niaj infanoj, li vivas for de mi, kiu ne estas plu necesa al li; vivas en akompano de pli juna virino, kiu amas lin kiel facilan elspezanton.

Jen la rezultato de la fina ago de mia malakceptita amanto! Ĉu vi ankoraŭ opinias, sinjoro profesoro, ke amo al mi regis lin, laŭ la libro via? Mi kredas ke tio kio estas farita en amo produktas bonon; kaj kio estas en malamo farita, malbonon. Mi kredas ke ne amo al mi sed malamo regis tiun mizeran viron. Saĝe viro povas skribi pri la funkciado de la cerbo homa, sed lasu virinon juĝi koron.”

En la horo de morto, kio regis en Petro

Amo aŭ Malamo?

M. James

SEVEN HOURS SUFFICED for learning to converse in Esperanto

As a practical test of Esperanto, Mr. J. D. Sayers induced a member of the Old Colony Club of New York, Mr. Charles B. Foley, a prominent and conservative business man, well known as an electrochemist and metallurgical expert, to give up an afternoon to a test study of our language. Commencing at 1 o'clock—Mr. Foley up to then knew no Esperanto—the sixteen grammatical rules and fundamental vocabulary were inculcated, and at 8 o'clock the student was introduced to a visiting Portuguese business man who knew Esperanto, Senor Carlo Ramos. For several hours the conversation continued, slow but perfectly intelligible, to the amazement of witnesses and of the student himself.

Mr. Foley's address is 2 Arnold Court, Bristol, Conn.

Needless to say, not every student could in seven hours master spoken Esperanto; but certainly it goes to prove that any ordinary mortal can acquire the language within the week of a voyage “across the pond.”

—o—PAROLEJO—o—

In but not about Esperanto | not over 500 words | free to all | signature and adress required
 En sed ne pri Esperanto | ne plu ol 500 vortoj | por iu senpage | nomo kaj adreso postulataj
 (The editors express neither approval nor disapproval of statements under this head, the
 facts are on the authority of the person named. Not open for any articles upon Esperanto
 subjects proper nor for advertising.)

NOVAJSERVO DE LA INTERNACIA LABORA OFICEJO

Rimarkinda Konsultlibro—Tutmonda Labora Adresaro

Ĉiuj personoj interesigantaj iamaniere pri demandoj rilate al industrio kaj laboro trovos ke unu el la plej altvaloraj konsultlibroj por ili estas la dua ĉiujara eldono de la **Internacia Labora Adresaro** jus publikigita de la Internacia Labora Oficejo de la Ligo de Nacioj. Tiu ĉi volumo estas presita en Angla, Franca, kaj Germana lingvoj, kaj enhavas sciigojn pri Registaraĵaj departementoj kaj privataj organizaĵoj sin okupantaj pri laboro kaj industrio en 72 landoj, sciigojn ne haveblajn aliloke.

La personaro de la Internacia Labora Oficejo penis kiom eble plibonigi kaj disvastigi la unuan eldonon publikigitan lastan jaron, kaj la nuna eldono enhavas informojn pri pli ol 1.800 mastraj asocioj, 2.300 laboristaj organizaĵoj, 600 intelektlaboristaj asocioj, 43 eksbatalantaj grupoj, 450 kooperaj societoj, kaj ĉirkaŭ 40 diversspecaj internaciaj institucioj. La nombro de paĝoj estas plimultigitaj de 600 al 1.000.

Unu sekcio donas mallongan rakonton pri la fondo de la Internacia Labora Organizaĵo kaj de la Ligo de Nacioj kune kun sciiganta historio de la laborado de la diversaj fakoj de la Oficejoj apartenantaj al tiuj institucioj. Dua sekcio donas liston de Registaraĵaj departementoj en la tuta mondo kiuj sin okupas pri laboro kaj industrio, kune kun skizo de la organizo kaj funkcioj de tiuj ĉi departementoj, nomoj de respondecaj oficistoj, kaj informoj pri oficialaj eldonaĵoj.

Oni treege zorgis fari kiel eble plej kompletaj la sekciojn enhavantajn tabelformajn listojn de la plej gravaj mastraj kaj laboristaj organizaĵoj en la diversaj landoj. Tiuj ĉi listoj donas ne sole la nomojn de iliaj ĉefaj oficistoj, sed ankaŭ la titolojn de iuj gazetoj eldonataj de ili, la lastajn disponeblajn ciferojn pri membraro, aŭ la nombro de firmoj aliĝintaj al mastra organizaĵo, kaj la naciaj kaj internaciaj aliĝoj de ĉiu organizaĵo.

Aliaj sekcioj aperantaj la unuan fojon en la nova eldono enhavas similajn listojn de naciaj kaj internaciaj organizaĵoj sin okupantaj pri intelektaj laboristoj kaj eksbatalantoj kaj la sekcio pri kooperaj organizaĵoj estas treege pligrandigita. En la lasta sekcio la dato de fondo kaj la ciferoj de la spezo estas donitaj kiam ajn ili estas disponeblaj.

Petate estas traduki kaj represigi.

* * * * *

Kiu volas ricevi senpagan ekzempleron de 16 paĝa broŝuro, 'Kremacio kontraŭ Enterigado,' povas ricevi per peto al

Cremation Association of America,
 Sekr. A. T. Rover, 519 Union Bldg., Cincinnati, Ohio

GEMS OF ESPERANTO LITERATURE
LA NASKIGO DE LA TABAKO

Araba legendo

Unu fojon vojaĝis la profeto Mahometo (Dio havu lin en sankta gloro) tra la dezertoj de Jemen. Estis vintro, kaj pro la malvarmeo la besto-rampajoj dormis la dormon de la longaj noktoj. La ĉevalo, sur kiu la profeto rajdis, metis unu hufon sur serpentejon, kaj tuj oni ekvidis serpenteton, dormantan de malvarmo. Mahometo kompatis la rampajon, deiris de la ĉevalo, prenis la serpenteton kaj metis ĝin en la manikon de sia mantelo, por ke la varmo de lia korpo ĝin revivigu. Kaj la varmo de la korpo redonis al ĝi la vivon. Baldaŭ ĝi ekmoviĝis, poste ĝi elmetis la kapon el la maniko kaj diris:

—Profeto, mi volas mordi vian manon.

—Ne estu maldanka, respondis la profeto.

—Mi tiel volas.

—Kiam vi montros al mi la kaŭzon, kiu vin igas fari malbonon al mi, tiam mi permesos al vi mordi min.

—Via gento, murmuris la serpento, ĉiam militas kontraŭ nia: la piedoj de la viaj kaj la hufoj de viaj ĉevaloj venkas ĉiam la niajn, kaj mi nun volas venĝi al vi.

—Nun ni parolas nek pri via gento, nek pri mia, respondis la profeto: nur inter vi kaj mi estas la afero. Kian do malbonon mi al vi faris? Ĉu mi ne faris al vi bonon, redonante al vi la vivon per la varmo de mia korpo?

—Malgraŭ tio mi volas vin mordi, por ke poste vi ne faru malbonon al miaj filoj nek al aliaj de mia gento.

—Tio ĉi, malbona rampaĵo, estos maldanko: vi pagos malbonon por bono. Ve al vi, kiu tiel malbone volas repagi la bonajon, kiun oni faras al vi!

—Mi volas, ekkriis tiam la serpento kolere, mi volas, kaj mi juras al vi per Dio la granda kaj potenca, ke mi mordos vin!

Aŭdinte la nomon de Allah, la profeto ne kuraĝis pli respondi. Li klinis la kapon kaj diris:

—Lia nomo estu laŭdata! Ni estas de Li kaj de Li ni havas la vivon!

Kaj li malkovris la manon, ke la serpento tie mordu. Kaj la serpento mordis la sanktan manon de Mahometo.

Tiu ĉi tiam, eksentinte la doloron, eljetis la serpenton malproksimen kaj malbenis ĝin en la nomo de Allah, ĉar ĝi estis maldanka, kaj kun ĝi li malbenis ankaŭ ĉiujn, kiuj pagas malbonon por bono kaj ne estas dankaj por la bonoj, kiujn oni faras al ili.

Poste la profeto alprenis la lipojn al la vundo, forte elsuĉis kaj elteris la venenon, kiun la rampaĵo tie lasis. Kaj li kraĉis sur la sablon de la dezerto. En tiu sama minuto sur la loko, kie falis la kraĉaĵo, naskiĝis kreskaĵo, rapide disvolviĝante kaj donante foliojn.

La araboj, kiuj akompanis la senditon de Allah, ekbruligis kelkajn foliojn, kiel oferon al Dio sola, pardonema kaj bonkora, kiu savis la estron de la kredantoj de pereco per la veneno; kaj tiam ili flaris la strangran kaj delikatan odoron, kiun tiu ĉi kreskaĵo donas, estante bruligata.

FOR THE STUDENT
THE ORIGIN OF TOBACCO

An Arabian Legend

Once upon a time the prophet Mohammed (May God hold him in holy glory!) was traveling thru the deserts of Yemen. It was winter, and on account of the cold the creeping things were sleeping the sleep of the long nights. The horse on which the prophet was riding set one hoof upon a snake's nest, and there was at once perceived a little snake sleeping from cold. Mohammed pitied the reptile, **dismounted** from his horse, took the little snake and placed it in the sleeve of his mantle, so that the warmth of his body might revive it. And the warmth of his body restored its life. It soon **stirred**, then put its head out of the sleeve, and said,

"Prophet, I want to bite your hand."

"Be not ungrateful," answered the prophet.

"That's what I want to do."

"When you show me the reason which makes you **do me harm**, then I shall let you bite me."

"Your tribe," murmured the snake, "is always warring with ours: the feet of **your people** and the hoofs of your horses are always **vanquishing our people**, and I wish now to get revenge on you."

"We are now talking neither about your tribe nor about mine," answered the prophet. "**The matter lies between you and me alone**. What harm, now, have I done you? Have I not done you good, in restoring your life thru the warmth of my body?"

"**In spite of that I want to bite you**, so that afterwards you shall do no harm to my sons nor to others of my tribe."

"This, evil reptile, will be ingratitude: you will be **returning evil for good**. Woe to you who wish so ill to repay the good act which is done you!"

"I wish it," the snake then exclaimed in anger. "I wish it, and I **swear** to you **by God the great and powerful that I will bite you!**"

On hearing the name of Allah the prophet did not dare **to make further reply**. He bowed his head and said,

"His name be praised! We are from Him and from Him we have life!"

And he uncovered his hand that the snake might bite it. And the snake bit Mohammed's sacred hand.

The latter, then, when he felt the pain, threw the snake far off and cursed it in the name of Allah, because it was ungrateful, and with it he cursed also all those who return evil for good and are not grateful for the good things which are done them.

Then the prophet pressed his lips to the wound, sucked it well, and drew out the poison which the reptile had left there. And he spat upon the sand of the desert. At that very moment, on the place where the spittle fell, there sprang up a plant, which rapidly **developed and gave forth leaves**.

The Arabs who accompanied the emissary of Allah lit several leaves as an offering to the one God, forgiving and kind, who had saved the master of the believers from death thru poison; and then

De tiu tago ĉiuj bonaj mahometanoj fumas la foliojn de tiu herbo mirinda kaj benita de Allah, plantas ĝin en la oazoj kaj flaras ĝian odoron kun respekto kaj ĝojo, ĉar ĝia gusto enhavas la maldolĉon de la veneno serpenta kaj la dolĉecon de la sankta kraĉaĵo de la profeto.

Laŭ la hispana rakonto de Cervera Bachiller tradukis
Jaime Heinlein Ferreira.

* * * * *

Notes

On method of study read first Note in May number. The applicational exercise is based mainly on the words and phrases in bold faced type.

